

LA PACDEFENDANTO

N-ro 17. NEREGULA ESPERANTO-INFORMILO POR ĈSR. Majo 1953

ĜOJ- KAJ SOLIDARECDEKLAROJ AL LA MINISTROJ ĈU EN-LAJ KAJ KIM IR SEN.

La ĉeĥoslovakaj esperantistoj bone komprenis la altan signifon de la decidoj de k-doĵ Ĉu En-laj kaj Kim Ir Sen koncerne la interŝanĝo de vunditaj kaj ceteraj militkaptitoj el la milito en Koreio, pri kiuj ĉefe ĝis nun disrompiĝis ĉiuj intertraktoj por fari pacon en Koreio. Niaj gek-doĵ preskaŭ en ĉiuj pli grandaj urboj kaj entreprenoj de Ĉeĥoslovakio organizis subskribadon de solidarecdeklaroj kaj ĝojesprimoj al ambaŭ ŝtatestroj, kiuj renkontiĝis ĉe la laboruloj kun granda simpatio. Nur en la urbo Plzeň subskribis en la nomo de 60000 membroj estraro de la Ligo de ĉeĥoslovakoj- katolika eklezio D-ro Jos. Černý, laboristoj de la Plzeň-bierfabrikejoj ktp. En Svit (Slovakio) kolektis subskribojn k-do Kostolný. Aliĝis naŭ grandaj organizoj: La Slovaka Komunista Partio de la nacia entrepreno Tatravit, de Chemosvit, la Ligo de ĉeĥoslovaka junularo kaj sindikataj organizoj de la samaj entreprenoj. Krome subskribiĝis ankoraŭ la fajrobrigadistoj kaj la organizo de la Ruĝa Kruco en Svit kaj finfine ĉiuj geesperantistoj. La solidarecesprimoj estis senditaj a la k-doĵ Ĉu En-laj kaj Kim Ir Sen pere de la Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, en Peking.

Denove klare montriĝis, ke la ĉeĥoslovakaj esperantistoj staras sur la avantgarda posteno de la proletara internaciismo kaj solidareco.

VIRINOJ, ANTAŬEN POR LA PACO.

Kiel vi vidas, la homaro estas daŭre minacata de nova milito. La maltrankvileco naskiĝas el tio, ke ni ne povas klare aŭdi, vidi kaj kapti la voĉojn kaj situaciojn de la popoloj mem, kiuj amas la pacon kaj deziras vivi feliĉe.

Ni esperantistoj havas la privilegion rekte interŝanĝi niajn voĉojn kiel fratoj tutmonde. Ni opinias, ke necesas disrompi ĉi maltrankvilecon kaj akiri pacan vivon per interŝanĝo de veraj voĉoj de la popoloj mem en la mondo. Nun ni, japanaj esperantistoj volas klopodi por tio. Precipe ni deziras lerni kaj ekscii ĉiujn aferojn pri virinoj el diversaj landoj per interŝanĝo de opinioj kaj materialoj. Plie ni deziras interŝanĝi kulturon por niaj infanoj.

Ni elkore deziras, ke ĉi tia laboro fariĝu utila por la paco. Ni povas ankaŭ al vi raportari pri nia nuna situacio. Se vi povas, bonvolu helpi al nia laboro kia ajn maniere laŭ via ebleco, ni petas. Ni diversmaniere utiligos viajn helpaĵojn, aŭ surĵurnale, aŭ per ekspozicioj. Tio certe interesigos la rigardantojn kaj propagandos samtempe bone nian lingvon.

Elkore ni atendas vian helpon. K-dino Kita Sotari, 72, Sieizyutaku, Kitaoĝimati, Kita-ku, OSAKA, Japanio.

EUGENIE COTTON PRI ESPERANTO.

En la jaro 1947 okazis en Praha internacia kongreso de la demokrata virin-asocio, kies prezidantino estis ĝis nun s-ino Eugenie Cotton. Tiutempe mi ankoraŭ deĵoris kiel Esperant-lingva paroisto en la radiostacio de Praha. Tiam atingis min urĝa sciigo, ke la prezidantino de la virina mondkongreso deziras paroli esperantlingva antaŭ la mikrofono de Radio Praha. La ĉefo de la radiostacio tuj disponigis al mi specialan aŭtomobilon kun magnetofono kaj mi venis en la kongresejon por intervui s-inon Cotton antaŭ la mikrofono.

S-ino Cotton, la prezidantino de la virina asocio estis simple aspektanta, sed tre nobla kaj agrabla persono. Montriĝis, ke ŝi ne scias esperantlingve paroli, sed ŝi tre favoris la internacian lingvon kaj estas pri ĝi bone informita. Ŝia edzo estis konata, tre bona franca esperantisto, kiu mortis en 1951. Ni interkonatiĝis france. Mi petis s-inon Cotton, ke ŝi diru ion al niaj eksterlandaj aŭskultantoj en Esperanto. Do ŝi verkis franclingvanparoladeton, kiun mi tradukis esperanten kaj instruis ŝin pri la Esperanto-prononado.

Vespere la sendstacio de Praha komunikis al la mondo jenan Esperantlingvan personan mesaĝon de s-ino Cotton: „La uzado de internacia helpa lingvo donus grandan utilon al ĉiuj internaciaj kongresoj. En ĉiuj kongresoj oni allasas maksimume kvar oficialajn lingvojn kaj el proksimume kvardek asociitaj landoj la dudeko estas devigata lerni oficialan lingvon, por ke ĝi estu komprenata almenaŭ

de parto de la aŭskultantaro. Sed se oni ellernus la facilan lingvon, kia estas Esperanto, la tuta mondo interkompreniĝus. Estas mia deziro, ke kelkaj virinoj el diversaj landoj interkonsentu lerni Esperanton kaj ke ili en iu venonta kongreso pruvu, ke ekzistas ebleco por interkompreniĝo. Per tio plifortiĝos la amikeco inter virinoj de la tuta mondo, kio estas unu el miaj plej ardaĵaj deziroj."

Cert ene grava eldiro de eminenta persono pri Esp-o, kiun ĉiuj esperantistoj kaj pacdefendantoj devus scii. Ni rimarkas, ke s-ino Cotton pro siaj meritoj en la paclaboro estis honorigita per la Stalinpacpremio.

Jar. Mařík - Praha

PROLETA INTERNACIIISMO

„Asocio de nova japana literaturo“ (konata organizo de proletaj japanaj literaturistoj) faris interkonsenton kun la ĉeĥoslovaka „Teatra kaj literatura aranĝejo“ pri senpaga tradukado kaj epdonado de ambaŭlandaj literaturaĵoj. Al ties efektivigo helpis en via lando k-do esperantistoj A. V. Zedník el Praha kaj I. Zálupský el Košice, el Japanio mi mem. Rezulte de Julius Fučík kaj la „Muta barikado“ de Jan Drda, „Batalo kontraŭ salamandroj“ de Karel Čapek kaj nun estas preparataj jenaj ĉeĥaj verkoj: Dramoj de Karel Čapek (Patrino, La blanka malsano k.s.), „Sireno“ de Marie Majerová, „Ribeligita lando“ de Jan Drda kaj aliaj aŭtoroj. Ĉi lasta novelaro estas de k-do Zedník tradukita Esp-lingven kaj por mia japana traduko bonvolis fari speciale k-do Štembera ok ilustraĵojn. La novelon de J. Drda el tiu kolekto, titolita „Langeloj de s-ro Hromak“, kiu priskribas la kontraŭgermanan rezistadon en ĉeĥa regiono, mi intencas publikigi en unu el la plejproksimaj n-roj de „Nova Japana Literaturo“ kun ilustraĵoj de k-do Štembera.

Eble tiuj ĉi faktoj utilos al vi kiel propaganda pruvo, kielmaniere granda organizo de progresemaĵoj jap. literaturistoj praktike utiligas Esperanton. Nia Asocio ankaŭ sendis kondolencleterojn okaze de la morto de via prezidento Kl. Gottwald kaj via fama verkisto Ivan Olbracht. La jap. originaloj estis akompanataj de Esp-lingvaj tradukoj. Ni konfidis ilin al k-do Zedník kun peto, ke li faru ĉeĥlingvan tradukon kaj transdonu al la kompetentaj instancoj. Li tre aktive helpas al mi la japanlingvan tradukadon el la ĉeĥa lingvo per respondoj kaj per klarigoj pri ĉeĥaj aferoj, kiujn mi ofte tre malfacile komprenas. Li ankaŭ estas peranto inter mi ka k-idino Gusta Fučíková.

Certe en via lando devas troviĝi ankoraŭ pli multe da samideanoj, kiuj kapablas traduki famajn ĉeĥajn verkojn esperantlingven same kiel k-do Zedník. Ili povus per tio multe kontribui por la disvastigo de via literaturo kaj samtempe por Esperanto. Kiu el vi estas preta fari tion?

(el letero de k-do T. Kurisu, Himonya 2-2298, Meguro-ku, TOKIO).

INSTRUISTOJ DE URUGVAJO FAVORAS ESPERANTON.

Post instigo flanke de la instruistoj infanoj en Montevideo priskribas en formo de kolektiva gazeto la regionojn kaj ĝiajn historiojn de Urugvajo akompanante ilin per desegnaĵoj kaj pentraĵoj belkolorigitaj. Per tiu gazeto la urugvajaj infanoj celas mobilizi la infanaron tutmondan al frata kunvivo, detruo de nacia malamo kaj kunigi la korojn de ĉiuj popoloj. Certe laŭdinda laboro, kiu ankaŭ grave kontribuas al la defendo de la mondpaco. Ni kredas, ke ankaŭ en nia lando troviĝos multaj infanoj, kiuj bonvenigos la proponon de la urugvajaj infanoj kaj instruistoj kaj preparos sendaĵojn, proskribante la pacan konstruadon kaj la historion de nia lando. Ĉion sendu al: Biblioteca Infantil N-ol.-Calle Adolfo Berro No. 1109, (Prado), Montevideo, Urugvajo (Sudameriko).

Eldonis:

Esperantský kroužek při Okresní osvětové besedě v Olomouc